


Falangieca eskapo lastamomentsave

La falangio kun siaj 2 longaj kaj 6 iom malpli longaj kruroj facil-movaj, artikhavaj, flekseblaj, kapablas balanci sian korpopendolon dum danĝero – same kiel simioj – ventorapidege de tigo al tigo.



Tio vere estas bezonata, ĉar multegas ĝiaj malamikoj. Se iu kaptintence tuŝas ĝian kruron, tiu estas deĵetata. Ankoraŭ horduonon la krura deĵetaĵo puŝe moviĝas – por turni la rabistan atenton al ĝi, cele de sukcesa ekfuĝo de “Paĉjo Longkrurulo”.

Malbonŝance la gambo ne post-kreskas. Tial oni vidas falangiojn kun 7, 6, 5 aŭ nur 4 kruroj – eĉ dukruruloj ekzistas. Speciale gravas la dua gamboparo, do tiu kun superlongeco. Ĝi enhavas delikat(eg)ajn vibradsensorojn, kiuj denuncas la alvenon de rabskarabo, same – se streĉita en la freŝan aeron – eĉ la alvenon de vespo.

Bonan sukceson, eta stilzirulo!

(2005-07-29)

La flava danĝero

Nur en la 18-a jarcento, kun la ekmodiĝo de la “teoria rasa disdivido”, kelkaj skribtablokulpuloj (kiuj neniam en siaj vivoj estis vidintaj iun ajn ĉinon) komencis deklari la ĉinojn “flavaj”. En disvastiĝinta manlibro ekz. profesoro de la universitato *Göttingen*, Germanujo, priskribis la mongolan rason kiel “plej ofte tritiko-flava, parte kiel boligitaj cidonioj aŭ kiel sekigitaj citronŝeloj”.



La prefero de la ĉinoj por la flava koloro cedis, memkomprene kaj bonvoleme, al tiu ĉi antaŭjuĝo. En Ĉinujo ja ekzistas la “Flava Rivero” kaj la legenda “Flava Imperiestro”.

La lasta imperiestro *Pu Yi* (1906-1967) skribis: “La tegoloj estis flavaj, la palankeno estis flava, la subŝtofoj de miaj vestaĵoj kaj ĉapeloj, la pelvetoj kaj teleroj – nenio ĉirkaŭ mi, kio ne estis flava”. Escepte de, kompreneble, la haŭto de liaj samlandanoj.

(2005-02-26/27)

Kial “flava”?

La jaroj 1665/66 grave ŝanĝis Londonon

1665 viktimis 100 000 Londonanoj al la “nigra morto”, la pesto. En la sekva jaro *John Faymore*, bakisto kaj kortega liveranto de reĝo Karlo II-a, forgesis estingi la fajron de siaj bakfornoj – kaj okazigis incendion, al kiu viktimis 13 000 domoj kaj 87 preĝejoj. Kvankam nur 8 homoj perdis siajn vivojn dum la malfeliĉo, la urbo ankoraŭ dum semajnoj subbruletis. La fajro unuflanke detruis antaŭ ĉio la grandajn loĝejojn en la centro de la urbokerno – sed, aliflanke, pro tio “malobstakliĝis la vojo” por novaj urbokonstruaj longtempaj planadoj.



(2005-03-07)

Ĉu ekzistas usona linio de Napoleono?

La lasta napoleona posteulo (de la usona branĉo) estis la en 1878 naskiĝinta *Jérôme Napoleon Bonaparte*. Lia patro, *Charles Joseph Bonaparte* (1851-1921), estis “Ministro pri Mararmeo kaj Justeco” (kaj fondis 1908 “*Bureau of Investigation*”, t.e. “Esplora Oficejo”, la poste tre famkonatan “*FBI*”). Tiu *Charles Joseph* estis nepo de la plej juna frato de Napoleono I-a *Jérôme*, kiu estis 1807/1813 “Reĝo de Vestfalujo”.



Jérôme Napoleon Bonaparte, la lasta usonbranĉa napoleona posteulo, mortis 1945 – pro la lezoj, kiujn li suferis kiam li fal(et)is en la nov-jorka “Centra Parko” sur la hundo-rimeno de sia edzino.

2005-03-10)

Pasko – ĉiujare alia dato

– ĉar la paskodato sekvas la lunkalendaron. La fruaj kristanoj celebris paskon samatempe kun la juda “*pesah*” – festo, do ĉe la unua printempa luno. Cele al limigado de judaj festoj, la koncilio de *Nicaea* en la jaro 325 decidis, meti paskon en la dimanĉon post la unua printempa plenluno. Sian originon el la judaj aŭ paganaj festoj jam lingvaje pasko ne povas nei. Ja ankaŭ la itala vorto por pasko, nome “*Pasqua*”, montras al la juda festo, kaj la germana “*Ostern*” mem devenas el la nomo de pagana festo por la printempa diino “*Eostrae*”.

Kial?

